Antaŭ nelonge staris ankoraŭ en la centro de Heerlen limŝtono kun sur unu flanko la nederlanda blazono kaj sur la alia aŭstria. En 1714 fariĝis Belgio aŭistria kaj restis tia ĝis la francaj revoluciuloj invadis Belgion. Limburgo estas entute bela ekzemplo, ke limoj estas nenaturaj. Ĉar la antaŭa duklando Limburgo dividiĝis en tri partoj, el kiuj unu apartenas al Belgio, unu al Germanio kaj unu al Nederlando.
Pro la veno de la minindustrio, fariĝis la landa sud-Limburgo prospera industri-centro, en la nuna tempo la plej grava en nia lando, ĉar nur pe la produktado de karbo aliaj industrioj estas eblaj.
Sed vi mem venu al Limburgo en 1947 kaj vi tiom vidos kaj admiros, ke vi certe ne bedaŭros vian venon. Limburgano.

PROPAGANDA-AANBIEDING.

Uit onze voorraad kunnen wij de volgende zeer doelmatige brochures enz. voor verlaagde prijs beschikbaar stellen voor de komende propaganda:

De vorderingen van het Esperanto	3	cent
Esperanto juist nu	3	„
Raambiljet	10	„
Ook beschikken wij nog over een voorraad van Esperanto op de school	1	„

Een supplement op Wat de A-candidaat van de geschiedenis van Esperanto moet weten, van W. F. Kruit, leveren wij u tegen toezending van 5-cents postzegel.

EL DANIO.
Karaj gekamaradoj.
Dum mia vizito en via lando, mi ricevis diversajn komisiojn de pluraj gek-doj.
Por plenumi tiujn mi komprenebIe bezonis iom da tempo, sed nun mi plenumis la plej gravajn el ili. Almenaŭ mi jam de longe sendis la librojn kaj alian, kian mi ricevis por transdoni al danaj gekorespondantoj.
Ĉiuj anoj de F.L.E. ricevu mian koran dankon pro la neforgeseblaj tagoj ĉe vi, ili estas la plej gravaj el tiuj, kiujn mi spertis.
Saluton via Holger Hansen.

KONSTRUŜTONOJ

PRI INFORMADO.
Legante kion oni rakontas pri ni en eksterlandaj gazetoj ni kelkfoje vole-ne-vole devas froti niajn okulojn. Ĉu ni estas dormantaj aŭ ĉu la ĵurnalistoj informas siajn legantojn intence malĝuste? Ĉar ni certe ne dormas, ni preskaŭ devas kredi, ke por certa speco de informistoj ne valoras la objektiveco, sed nur la sensacieco. Tiel antaŭ nelonge iu amerika ĵurnalo skribis, ke la nederlanda popolo estas tre kontenta sub la regado de la reĝino kaj ke en nia lando la libera ekonomio kaj la bridita ekonomio harmonias inter si. Pri la unua aserto ni povas levi la ŝultrojn, ĉiu havu pri ĝi sian propran juĝon, tio estas afero pli de la sento ol de la saĝo Sed la dua aserto estas ne malpli ol mensogo. Ĝi estas same naiva kiel la ankoraŭ ne malnova onidiro, ke ĉiuj nederlandanoj iras per lignaj ŝuoj.
Ĉiu mem povas trovi malĝustajn kaj malverajn eldirojn pri nia lando en alinaciaj gazetoj aŭ eĉ en korespondado kun eksterlandanoj. Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis petleteron el Germanio en kiu la korespondanto skribis, ke ni certe povas havigi al li nutrajpaketon, ĉar en nia lando nutrajo abundas kaj ni ja estas riĉaj. Legante tion, mi ĝemis. Se tio estus nur vera! Ĉi-rilate la Esperantistoj havas belan taskon. Ili povas per sia tutmonda lingvo informi la eksterlandon kaj ili do faru tion, sed nepre informu la mondon ĝuste! H. Sch.

TRA LA ESPERANTO GAZETARO

Internacia Kulturo, organo de la Bulgara Esperanto-Asocio atestas pri vigla Esperanto-vivo en Bulgario, kaj pri multpromesa entuziasmo, naskita en la liberiĝo post la militaj doloroj kaj antaŭmilita kontraŭemo al subpremo de la tiama reĝimo.

Svenska Esperanto-Tidningen, La Espero, organo de la Svenska Esperanto-Federacio. Varia enhavo, plaĉe redaktita. Raportas pri vivanta movado sukcese trairinta la malfacilajn militjarojn. Adreso: Postfack 19071, Stockholm 19, Svedio.

Pacifismo, oficiala informilo de la „Internacia Ligo de Esperantistaj Pacifistoj". Adreso: R. Melo, 4 st. J. C. Tissot, St. Etienne, Francio.

La organo de la Laborista Esperanto-Kunularo **Per Unu Voĉo**, en Sud-Afriko, donas bonajn kaj klarajn artikolojn pri la situacio en Sud-Afriko de la laboristoj kaj indiĝenoj. La raportado el la tiea gazetaro estas tre instrua; la redaktado lerta. Kun intereso oni legas ĝin kaj.... ekkonas la landon kaj ĝiajn morojn. Cetere diversa enhavo: literaturo, scienca kaj aktuala. Bonega promeso de la tiea juna laborista Esperantomovado. Adreso: Poŝtkesto 7356, Johannesburg, Sud-Afriko.

La Verda Flamo, oficiala organo de Maroka Esperanto-Asocio. Varia artikolaro, instrua, distra kaj informa. Atestas pri serioza laborado por la esperanto-movado. Adreso: 5, rue Savorgnan de Brazza, Casablanca, Maroko.

Eksterlandajn gazetojn interŝanĝe sendu al la redakcio de L.E., Middenweg 226, Amsterdam (O.), Nederlando.

★ S.A.T.-KOLONO

Dum relative longa tempo ne aperis en L.E. la S.A.T.-kolono, per kiu ni celadis pligrandiĝi ĉe la F.L.E.-anoj la komprenon kaj la interesiĝon pri la lab. esperantismo ĝenerale kaj pri S.A.T. aparte. Tiu propagando ne restis senefika; la interesiĝo ĉe la F.L.E.-anoj pri la Esperanto-movado trans niaj landlimoj daŭre kreskis, kaj la deziro aparteni al tiu movado montriĝas per la pli ol mil membroj, kiujn S.A.T. nun havas en Nederlando. Tiu milo sendube formas la bastionon en nia landa asocio; estas ja ili, kiuj estas la pli malpli „ĝismedolaj" esperantistoj, kiuj ne *povas* forlasi nian movadon, ĉar por ili la movado estas parto de ilia vivo. La baldaŭan restarigon de nia F.L.E. post la milito, ni ĉefe dankas al tiaj membroj, la amatoroj grandparte ne revenis. Niaj pli ol mil membroj pruvas, ke S.A.T. ne multe malgajnis pro tiu dizertado. Ili pruvas, ke la *kvalito* de nia F.L.E. membraro certe estas pli alta ol antaŭ la milito, kiam ni havis preskaŭ 5000 membrojn. Neparolante pri la kelkaj k-doj, kiuj pro principaj motivoj restis ekster la vicoj de S.A.T., ni aŭdacas aserti, ke la pli ol mil membroj de F.L.E., kiuj ankoraŭ ne aliĝis al S.A.T., formas la pli malfortan parton de nia por-esperanta asocio simple pro tio, ke ili ankoraŭ ne konscias pri la esenca karaktero de la esperanto-movado, la *internacia per*-movado. Per la konsciigo de tiuj membroj ni ne nur utilas al S.A.T., sed ankaŭ al F.L.E. Tial ni devas daŭrigi nian agadon komprenigi al tiuj duon-esperantistoj, ke la plena esperanto-movado povas esti nur la *tutmonda* movado kaj ke la praktikado de la lingvo superas ĉion alian. Sen organizo ne povas ekzisti movado. Tial ni devas ĝin subteni.

S.A.T. havas en Nederlando pli ol mil membroj. Ĝojiga rezultato! Sed ni ne estas jam pretaj. La dua milo povas kaj devas esti varbata! Ne nur favore al S.A.T., sed ankaŭ por certigi la kreskadon de F.L.E. Necesas, ke ĉiu S.A.T.-ano helpu la sekcian peranton ĉe tiu varbado.

Tiuj, kiuj nun aliĝas, pagas nur 1.50 gld. kiel kotizon ĝis la fino de ĉi jaro. Ĉion oni sendu al k-do van Essen, Floretstr. 10, Rotterdam-Z. Kaj nun: eklaboru! B. Wels.

—

DEZIRAS KORESPONDI:

Junaj gimnazianoj kun junularo el ĉiuj landoj. Adr.: Gimnazio de Z. Petkowska, Lodz, ul. Wolczanska 55, Polio.

Anoj de la Sutton Esp. Klubo, 3 Hillcroome Road, Sutton, Surrey, Anglio.

14 entuziasmuloj: skribu al Frank Netrval, 16 Leamington Road, Blackburn, Anglio.

EL ESPERO KATOLIKA

Inter la katolikaj Esperantistoj ekzekutitaj de la Nazi-tiranoj estis Pastro Metzger kaj Prof Walter Knopf. Nazi-juĝejoj kondamnis ilin je morto pro „perfido". Pastro Metzger estis ekzekutita la 17an de Aprilo 1944 kaj Prof. Knopf jam en aŭtuno 1939. Pastro Metzger fariĝis Esperantisto antaŭ la unua mondmilito. Li estis unu el la ĉefaj fondantoj de „Internacia katolika". Prof. W. Knopf estis en 1919 fondinto de la kat. Esp. societo „Frateco" en Beuthen, urbo proksima al Polio. Li forte kontraŭbatalis la Hitler-movadon.
Pastro Lucjan Kukulka, fervore esperantisto, kiu kiel profesoro dé la ŝtata gimnazio en Bydgoszcy (Polio), instruis Esperanton al siaj lernantoj, same estis arestita de la „gestapo". Dum kelkaj monatoj kruele turmentitaj li en 1939 mortis.

—

MORTIS KARL MINOR (L.K.)

La 22an de marto mortis en Germanio Karl Minor, interpretisto de la Militista Registaro. Li estas konata i.a. kiel tradukinto de „Natan la Saĝulo" kaj „Homoj en milito". Li gvidis lingvan angulon en Sennaciulo. La esp. movado perdis fervoran kaj sindoneman kunlaboranton. (The Worker Esperantist).

ALG. NED. ESP. EXAMEN COMM.

Uitslagen der Esperanto examens.

Amsterdam, 30-5-1946.

Aangemeld voor B 6 candidaten, opgekomen 5, geslaagd 3: G. Brugman en J. v. Munster te Amsterdam, A. M. Lommerse te Hillegom.

Aangemeld voor examen A 43 candidaten, opgekomen 40, geslaagd 29: J. R. Breek, E. v. d. Broek, G. Broer, A. Gloudie, J. J. Hagedoorn, A. Huisman, H. M. Janszen, D. Jongeleen, H. Kalf, J. M. Klaassen, J. Koeman-Geerlings, C. Kolls, M. Lamfers-Prins, J. E. v. Lier, N. Nientker, G. Scheffel, H. H. Tjerks en Th. Waardenburg, allen te Amsterdam, N Bakker te Bergen (N.H.), M. Cohen en J. S. Veen te Haarlem, D. Bakker en G. v. d. Molen te Heiloo, J. J. Appelman te Hem (N.H.), J. Oostveen te Sassenheim, T. Vrielink te Schagerbrug (N.H.) en W. J. H. Derks te Tilburg.

Leeuwarden, 30-5-1946.

Aangemeld voor examen B, 3 candidaten, opgekomen 3, geslaagd 2: C. W. v. Altena te Groningen en J. v. d. Meulen te Sneek.
Aangemeld voor examen A, 23 candidaten, opgekomen 18, geslaagd 12: J. U. Venema te Dantumawoude, E. Thoma te Groningen, G. T. Kingma te Hengelo (O.), H. S. Weitering te Huizum, A. A. Drent, J. Dijkstra, B. Goedemoed, E R. Havinga, G. E. H. J. Hotkamp, F. H. Kat, IJ. M. Komrij en P. Toornstra, allen te Leeuwarden.

Rotterdam, 30-5-1946.

Aangemeld voor examen B, 2 candidaten, opgekomen 1, geslaagd 1: J. M. Krul te Schiedam.

Aangemeld voor examen A, 30 candidaten, opgekomen 29, geslaagd 21: N. de Jong, A. v. Staveren, G. v. d. Wal en J. I. v. d. Wal-v. Straaten te Den Haag, L. F. H. B. v. Meegersen, A. Schouten en F. S. Vermeulen te Gouda, G. v. d. Lecq te Reeuwijk, J. Baks, M. A. Blok, A. Bouwer, J. Geurtz, W. Geurtz, W. Kervezee, A. Kley, L. Pelgrim, A. Plaizier, N. Volegraaf-Holl en Ch. Worms, allen te Rotterdam, A. v. Luipen te Schiedam en J. J. Sluis te Vlaardingen.

Tijdens dit examen huldigde de voorzitter den 2000sten candidaat, en overhandigde hem een voor deze gelegenheid geschreven oorkonde, benevens een boekwerkje.

MEMORTABULO H. J. BULTHUIS.

En Aprilo 1945, kelkajn tagojn antaŭ la liberigo de Nederlando, mortis en Noordbroek, forgesita vilaĝo en la provinco Groningen, unu el la plej malnovaj pioniroj de Esperanto en Nederlando, S-ro H. J. Bulthuis. De la plej fruaj tagoj de la Esperantista vivo en nia lando ĝis sia morto li senlace okupis sin pri la internacia lingvo, tradukante, verkante kaj prizorgante la administradon de longa serio da Esperantaj ekzamenoj.
Ĉu ne multaj Esperantistoj, kiuj ĝuis pro la legado de liaj verkoj kaj admiris la abundan riĉecon de lia fantazio, aŭ kies diplomojn li prizorgis kaj subskribis, deziros honori lian memoron per starigo de modesta monumento sur lia tombo en la malproksima nordo?
La filo de S-ro Bulthuis, la konata pentristo kaj skulptisto Piet Bulthuis, jus modlis belan memortabulon kun la bildo de sia patro kaj randskriba devizo, kiu trafe karakterizas nian diligentan kaj modestan pioniron: „Labori, pensi kaj lerni estas vivi".
Sed la fandigo de tiu tabulo en bronzo kostas monon.
Pro tio la subskribintoj, nederlandaj membroj de la Lingva Komitato, en kies laboroj ankaŭ S-ro Bulthuis partoprenis dum multaj jaroj, invitas la nederlandajn samideanojn sendi al ili siajn kontribuojn por tiu celo.

P. Heilker,
Ir. J. R. G. Isbrucker,
Fr. Wigbertus v. Zon.

Adreso por monsendoj: Ir. J. R. G. Isbrucker, Oostduinlaan 32, Den Haag, ĝirokonto N-ro 10866.

Nederlandse Vereniging van Blinde Esperantisten „Nosobe".

Voor de oorlog bloeide de Esperanto-beweging in de kringen der blinden en kenden betrekkelijk velen onder hen de internationale taal. Geen wonder, want juist Esperanto maakt het hun mogelijk couranten, tijdschriften en boeken in Brailleschrift uit te geven en om contact te krijgen met hun lotgenoten van over de grenzen. Ook in ons land, binnen het kader onzer vereniging, bestond een levendige activiteit, mede dank zij de financiële hulp, die wij welwillend van vrienden en belangstellenden in ons werk mochten ontvangen.
Wij staan thans voor de taak weder op te bouwen wat verloren ging, een taak, die we reeds met vertrouwen en energie zijn begonnen, zodat binnenkort zowel in ons land als vanuit Zweden de eerste periodieken in Braille weer zullen verschijnen. Maar om te kunnen voortzetten is er geld nodig, veel geld, dat bij lange na niet alleen door onze leden kan worden opgebracht. Het is daarom, dat we een dringend beroep doen op allen, die sympathie en interesse hebben voor ons werk, ons daadwerkelijk te steunen. In de eerste plaats richten wij ons tot onze donateurs van voorheen met het verzoek, ons hun jaarlijkse bijdrage wederom te doen toekomen.
En voorts richten wij ons tot allen, die met ons streven accoord gaan, om ons te steunen door donateur van onze organisatie te worden (jaarlijkse bijdrage minstens ƒ 2.50) of ons met een gift te helpen.
Zoals voorheen hopen wij in de toekomst onze begunstigers weer met ons werk op de hoogte te houden.

R. Israëls.
I. A. de Vos, Secretaris,
Herlaerstraat 24a, Rotterdam.
P. v. d. Wel, Penningmeester,
Jan de Weertstraat 49, Den Haag.
Gironummer 194703.



BESTUURS MEDEDELINGEN

Propaganda-Congres in Utrecht op Zaterdag 7 September a.s.
Het congres-comité is samengesteld als volgt: E.A.Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht, voorz.; H. A. v. Dijk, Poelhekkestr. 3, Utrecht, secr.; J. Moll, Begijnekade 2, Utrecht, penningm.; W. Geitenbeek, Kritzingerlaan 60, Zeist, Alg. zaken.
Er wordt een ere-comité gevormd, waarin 4 vooraanstaande personen zitting hebben en een comité van aanbeveling van pl.m. 40 personen. Prof. Waringhien (Frankrijk) behandelt: „De taalkundige waarde van Esperanto". Zijn rede zal in Esperanto worden uitgesproken en vertaald.
Ds. F. A. Hofman, Leeuwarden, zal als spreker voor de N.C.E.V. optreden, over „De bruikbaarheid van Esperanto voor Christenen".
Met enige andere sprekers wordt nog overleg gepleegd.
De Vara heeft toegezegd een reportage te verzorgen.
De genodigden ontvangen een envelop met onze geschriften.
Toegangskaarten voor het congres moeten besteld worden bij de deelnemende organisaties, dus voor onze leden (bij voorkeur via de afdeling) bij ons secr., Postbus 8002, A'dam (W.).

Radio-uitzending.

Op 3 Aug. a.s. spreekt voor de VARA van 4—4.15 uur, Mr. A. J. Kalma, lid van het N.C.K.E., onderwerp:
Esperanto, een eis van de nieuwe tijd.

De Libro-Servo

is van 5—10 Augustus wegens vacantie gesloten.

Propaganda.

In het begin Juli gehouden congres van het N.V.V. vonden de ca. 300 afgevaardigden op hun plaats een exemplaar van L.E. van Juli '46 en onze brochures, benevens een circulaire, waarin wij ons tot hun richtten.

Strooibiljetten.

220.000 van onze „verkiezingsstrooibiljetjes" werden besteld. Voor de groene maand komt een nieuw „flugfolio" uit, bij bestelling van voldoende aantallen met adres van de afd. Men bestelle vroegtijdig.

F.L.E. Amikaro.

Aan alle afdelingen en districten zijn de „aliĝiloj" voor de F.L.E.-Amikaro verzonden. Indien het aantal niet toereikend of niet ontvangen is, vrage men zo spoedig mogelijk aan.

Een Nieuwe Afdeling

werd opgericht in Nieuwe Niedorp. Secr. k-do Olie, Langereis A 71.

Organiza Kongreskomitato.

La sepan de Julio okazis en Maastricht distriktkunveno, en kiu estis elektata la O.K.K. por la venonta kongreso en Heerlen.
Oni elektis la jenajn ĝekdojn.
J. Sterken, Vorstenstr. 60, Heerlen, Prez.; H. Hartman, Maastrichterlaan 39, Waubach, Kas.; J. v. Woensel, Spoorstraat 9, Nuth, Administranto; k-dinon H. de Lange—v. Woensel, Spoorstraat 9, Nuth, Sekr.; k-don L. Zijlstra, Schandelermolenweg 5, Heerlen, Protokolanto.

Contributiefacturen.

Met betrekking tot de gezonden contributiefacturen ontving ik verschillende brieven. Hieromtrent zij het volgende opgemerkt.
Voor de bonds-administratie is het nodig, contributiefacturen te maken en voor de afd. penningmeesters is het gemakkelijk, te weten welke contributie zij te betalen hebben. Op die wijze worden abuizen voorkomen.
Door gebrek aan tijd heb ik de contributiefacturen voor de 2 eerste kwartalen 1946 tegelijk gemaakt en verzonden. Inmiddels hadden verschillende afdelingen reeds betaald. Maar is het feit, dat men een factuur ontvangt voor een bedrag dat reeds betaald is, een reden om onmiddellijk naar de pen te grijpen en een verwijtende brief te schrijven?
De zaak is dus, dat iedere afd. penningmeester een contributiefactuur ontvangt, ongeacht of de contributie inmiddels betaald is of niet. Deze facturen zijn dus niet te beschouwen als een verkapt verwijt of aanmaning, maar zijn eenvoudig een administratieve noodzakelijkheid. J.P.

Betaling contributie.

De afd. penningmeesters worden er op gewezen, dat van 1 Juli af de contributies geïnd worden door de penningmeesters van de **provinciale** districten, die op hun beurt het verschuldigde bedrag aan den bondspenningmeester en de plaatselijke districten afdragen.

Betalingen per giro.

De rekeningnummers van onze bond en Libro-Servo zijn:
Bond. Postgiro 331133, Gem. Giro Amsterdam F 930, nog ten name Fed. v. Arbeiders-Esperantisten, Amsterdam-W.
Libro-Servo. Postgiro 111278, ten name Libro-Servo v. d. Federatie v. Arbeiders-Esperantisten, adres als voren.

Statistiek.

Vele afdelingen hebben ons nog steeds de statistieklijsten niet toegezonden. Mogen we erop rekenen, dat de achterblijvers nu spoedig tot verzending overgaan?

STATISTIKO PRI LA KURSOJ.

Sezono 1945a—1946a.

Nur 46 sekcioj el la 83 respondis nian demandaron. El Amsterdam nur 7 sekcioj, el Rotterdam nur 1. Krom tio respondis al la demando pri eventualaj sugestoj nur 14 el la 46 sekcioj, ensendintaj la statistiklistojn. Tiamaniere ni neniam povos akiri ĝustan superrigardon pri la aktiveco en nia Asocio. Ni esperu, ke oni estontece pli akurate agu en tio. Jen sekvas la ciferoj.

Aranĝitaj kursoj:

		Nombro da kursanoj			
	Kursoj	Komenco	Januaro	Aprilo	Perdo
Por Plenkreskuloj:					
Komencaj kursoj	56	981	631	450	531
Daŭrigaj kursoj	21	179	156	126	53
A-diplomo	9	66	53	47	19
B-diplomo	4	26	21	19	7
Por Infanoj					
Komencaj kursoj	5	159	111	88	71
Kursoj gviditaj por aliaj instancoj	10	113	77	71	42
Entute	109	1524	1049	801	723

Okazis 5 kursoj en kunlaboro kun membroj de la N.C.K.E., 2 kursoj en la kadro de la A.J.C. kaj 2 kun J.V.O. Krome niaj membroj gvidis kursojn por E.V.C., 1; Kvartalunuiĝo, 1; iu Vlamgrupo, 1; A.N.G.O.B., 1.
Kursmono estis; Amsterdam, f 7.50; Rotterdam, f 3.50; Hago f 10.—; Andijk senpage: La plimulto enkasigis la monon semajne. Nur unu postulis la tutan sumon en 5 semajnoj. La kursoj okazis en; lernejoj, 22; luitaj salonoj, 79; ĉe membroj hejme, 8. Kaŭzoj de la malkresko estis laŭ la listoj; Malvarmo, dancado kaj tempomanko. Sep sekcioj deziris uzi „Nian Lernolibron", 3 elektis „La Komencanton". Estis tamen ankaŭ kiuj opiniis L.K. tro konciza, alia diris „ne sufiĉe facila". Unu deziris pli amuzon ol gramatiko. Alia volas eksperimenti per la nova lernolibro de de Bruin.
En la 43 sekcioj, kiuj respondis la demandliston estas 68 membroj kun B-diplomo, 318 membroj kun A-diplomo kaj entute 68 junuloj inter 17 kaj 25 jaroj.
Ĉar ni ne posedas la informojn de ĉiuj, ni ne povas tiri el ĉi supraj ciferoj nian konkludon. Sed unu konkludo tuj estas videbla, nome ke ni devas trovi rimedojn por teni la kursanojn en niaj kursoj fdv.

ATENTO POR LA VERDA KABARETO.

Mi estas fama persono. Mi jus tion sciiĝis. Kaj fiera pro tio mi ne povas ne anonci ĉi novajon. Ĉu mi ŝercas? Estas tiel, tamen kulpas pri mia malseriozaĵo la „Verda Kabareto"!
Ĝi ludis en Amsterdama sekcio kaj amuzis la, bedaŭrinde ne plenan, salonon. Mi ne recenzos la ludon. Tion mi ne rajtas, ĉar la kunlaborantoj faris sian eblon kaj mi estas konvikita, ke en bonaranĝata festa kunveno, iliaj prezentaĵoj tre efike gajigos la sferon. Ni faru iom da reklamo por la plej juna ido en nia movado de seriozuloj. La „Verda Kabareto" tion indas.
Sed por ke ĝi floru, necesas invitoj, kiuj donas okazon por studi kaj pligrandigi la kunlaborantaron.
La prezentado de la diversaj originalaĵoj, simplaj sed tial despli ĝuindaj, okazas en Esperanto klare parolata, por ĉiuj kompreneblaj.
Vi do invitu la „Verdan Kabareton" sed nur kiam vi estas certa pri plena salon(et)o!
Adreso:
Dick Veen, Pieter v. d. Doesstraat 98², Amsterdam (W.).



EL LA DISTRIKTOJ

DISTR. AMSTERDAM.

Sekr.: Kijkduinstraat 103.

La 25an de Aŭgusto okazos en kunlaboro de k-do van Rhee el Weesp ekskurso al Weesp kaj Muiderslot. Ni esperas ke almenaŭ tiom da partoprenontoj anoncos sin kiom por la ekskurso al Volendam. Vi do disponu tiun daton por Weesp!
Cetere mi petas al la sekciaj sekretarioj, sendi al mi liston de la gemembroj enhavantan la nomojn, adresojn, profesiojn, kiajn diplomojn ili posedas kaj funkcion en nia movado. Tiel ni havos bonan kartotekon.
H. J. Veldman.

DISTR. OVERIJSSEL.

Geraniumstraat 5, Zwolle.

In de op 14 Juli te Almelo gehouden jaarvergadering werd het bestuur samengesteld als volgt: O. Brandsma (Zwolle), voorzitter, tevens lid van de bondsraad; A. ter Braak, secretaresse; H. Julsing (Hengelo), penningmeester; C. Hogenbirk (Almelo), H. Timmer (Deventer) en H. v. d. Pieterman (Enschede).

DISTR. ROTTERDAM.

Sekr.: Floretstraat 10.

Al Krimpen!

La 18an de aŭgusto la R-dama Distrikto ŝipveturos al Krimpen a/d Lek por tie esti la gasto de la tiea sekcio. Kolektiĝo je la 9.30 Oosterkade apud stacio Maas. Ĉiu partoprenu, ankaŭ la regionaj sekcioj. Ni havas programon por ĉia vetero. Ne forgesu vian naĝveston.

DISTR. UTRECHT.

Sekr.: Burg. Patijnlaan 158, Zeist.

La 1an kaj 2an de junio, ni estis la gastoj de la Amersfoorta sekcio.
Estas bedaŭrinde, ke ne pli da Distriktaj anoj partoprenis. Ni dankas niajn Amersfoortajn k-dojn pro la agrabla semajnfino!
La 30an de junio, invitita de la ĝen. membro k-do W. v. Hees, ni vizitis Rhenen.
Estis agrabla tago pro kiu ni dankas al k-do W. van Hees kaj al la „Ned. Buurtspoorweg Maatschappij" pro la rezervita vagono.
J. Koster.



EL LA SEKCIOJ

SEKCIO AMSTERDAM XIII „LIBERIGA STELO".

Sekr.: Westlandgracht 145 III.

La 20an de junio ni festis la unujara ekzistadon de nia sekcio post la milito kaj de nia 3a jarkvino. La salono estis preskaŭ tutplena kaj la programo tre amuza, precipe pri la ludado de la muzikgrupo „Verdaj Steloj".
Ni intencas aranĝi ekspozicion en septembro. Ĉiuj kolektu materialon kiel kovertojn, leterojn de viaj korespondantoj, poŝtmarkojn k.t.p. kaj transdonu al la estraro. Kunlaboru, por ke la propagando en nia kvartalo fariĝu granda sukceso.
J. Hennekey.

SEKCIO DEURNE-ANTVERPENO. „ANTAŬEN".

La 12an de julio ni priparolis la farotan laboron. Ni organizos amuzvesperon en kunlaboro de „Arbeidersopvoeding" la 31an de aŭgusto. Ni invitos ĉiujn Antwerpenajn Esp. grupojn. La eniro estos senpaga. Ĉiuj esperantistoj kaj simpatiantoj estos bonvenaj. La 7an kaj 8an de septembro ni havos esp. ekspozicion, ankaŭ en kunlaboro de „Arbeidersopvoeding". La 7an solena malfermo je la tria posttagmeze, la 8an, dimanĉe, vizitebla la tutan tagon. Pli da novajoj oni legos en la „De Volksgazet" aŭ „De Vuurtoren" en Antwepeno. La du festoj okazos en nia partisalono „Den Hertog", Herenthalsebaan 251, Deurne (je la halto de tramo 24 kaj 42).
sekr. J. Cautaert.

SEKCIO EINDHOVEN „LUMEN".

Post longa dubo, ni nun oficiale sciiĝis, ke nia aktiva membro:
J. W. Jonker, je la 15a de Novembro 1944 estas mortpafita de la faŝistoj.

SEKCIO GOUDA.

„Konkorde Antaŭen".

La 3an de julio okazis nia jarkunveno. K-do A. d. Vries anstataŭas k-don B. Terlouw en la estraro. K-do Terlouw intencas refondi la sekcion en Gouderak.
La estraro nun konsistas el la jenaj k-doj: J. Z. Hordijk, prez.; P. Roos, sekr., Wilhelminastraat 3; P. v. d. Star, kas.; W. v. Heeren, libroservanto kaj A. d. Vries, asesoro. Ni priparolis la propagandon dum la verda monato kiu certe fariĝos sukceso, kiam ĉiuj anoj partoprenos. La 23an de junio k-do A. v. Haren asocia estrarano el Amsterdam paroladis por nia sekcio pri la diferenco inter federacia kaj centraliza formo. La parolado kaj la vizitado estis bonegaj.
La konversaciaj vesperoj ne okazos dum la monato Aŭgusto, ĉar tiam ni ne rajtos uzi la lernejon. La sekretario P. Roos.

SEKCIO GRONINGEN.

Sekr.: Grunostraat 8.

Niaj konversacivesperoj estas allogaj dum la lasta tempo. La vizitado estas kontentiga, tamen forrestas ankoraŭ multaj geanoj. Al tiuj mi forte instigas foje veni en „Het Buurthuis". Ili certe ne bedaŭros tion.
Ni komencas la vesperon per prelego, rakonto aŭ pritraktado de la gramatiko. Poste agrabla konversacio. Unufoje ĉiumonate speciala allogajo, lotumo de unu aŭ du bonaj libroj. Vizitu do regule la konversacivesperojn kaj ne forgesu kunporti „Ni Kantu". Kiu volas prezenti ion en la klubvesperoj anoncu tion al la sekretario. Ni penas aranĝi la klubvesperojn tiom eble plej allogaj, sed ne povas fari tion sen via kunlaboro. Do ĉiu kunlaboru laŭpove.
Por ĉio, kio rilatas al „La Progresanto" vi turnu vin al k-do R. v. Kempen, Oliemuldersweg 166.

SEKCIO HAARLEM.

Nassaustraat 12 rood.

La 5an de julio ni kunvenis en „Cultura". Ĉar en nia rondo venis du svedoj nome fino kaj s-ro Hendrikson ni invitis ankaŭ la neŭtralulojn kaj la katolikojn. Ni konstatis, ke la paroladoj de nia prezidanto, s-ro H. kaj fino H., same kiel la teatrajo, kiun ni prezentis kaj le deklamo de k-do S. tre plaĉis. Agrablan vesperon ni havis. Gek-doj, venontan fojon, vi ĉiuj venu! G. Gerlofs.

SEKCIO HAGO.

Subsekcio „Zuiderpark", Larensestr. 56.

Jam de longe ni ĉiujaŭde konversacias en ĉi supra adreso, sed nur malmultaj anoj regule venis. Estonte ni komunikos nian programon monate en H. I., espereble tiam pluraj anoj ĉeestos. Doco.

SEKCIO ROTTERDAM II.

Sekr.: Lange Geer 28.

Nekrologo.

La 23an de junio mortis post sufiĉe longa malsano, nia plej maljuna ano, k-do Christiaan van der Lugt, Maarland 47, R'dam-Z. en la aĝo de 75 jaroj. Ni perdis en li ne nur simplan anon sed ankaŭ agrablan homon, kiu ĉiam fidele vizitis niajn konversaciajn vesperojn.

SEKCIO SCHAGEN.

Sekr.: D 38, Barsingerhorn.

La 16an de Junio ni jarkunvenis. La financa parto estas tre kontentiga. La rezultoj de la kursoj en kelkaj vilaĝoj estas diversaj. En Terdiek ni povas fondi novan sekcion kaj en Lutjewinkel ni formis infangrupon, sub gvido de nia k-do Rienks.
La estraro konsistas el k-doj C. Joon, prez.; C. Vos, sekret.; A. Winkel, kasisto; J. Winkel, libroserv. kaj; J. Jonker asesoro.
C. Vos.

SEKCIO UTRECHT „FRATECO".

Sekr.: Jan Haringstraat 1 bis.

La 20an de Junio nia estraro kunvenis. Unue nia prez. k-do van Dijk bonvenigis k-don Knip, kiu feliĉe revenis en nia mezo. Ĉar lia funkcio estis por li konservita, li nun ree akceptis ĝin. La adreso de la sekretario do nun estas k-do Knip, Jan Haringstraat 1 bis, Utrecht. Cetere ni pritraktis la inviton de la diversaj Esp. grupoj al kunlaboro.
K-doj Knip kaj van Dijk estas komisiitaj viziti la komunan kunvenon.
P. Havers.

EL LA NEŬTRALA MOVADO:

La XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en sia ĝenerala kunveno de la 9-a de junio 1946-a.
1º esprimas la deziron ke la neŭtralaj internaciaj Esperanto-Asocioj senprokraste kaj en reciproka toleremo pristudu la eventualan reunuiĝon de la neŭtrala internacia Esperanto-Movado;
2º esprimas la esperon, ke tiu de ĉiuj sopirata unueco efektiviĝos plejlaste okaze de la unua postmilita Universla Kongreso;
3º instigas ĉiujn internaciajn Esperanto-Asociojn, neŭtralajn aŭ ne-neŭtralajn, pristudi senprokraste la starigon de tutmonda Esperanto-instanco kiu reprezentus ĉiujn esperantistojn senescepte.
Nome de la estaro
Dro T. van Gindertaelen, prez.
Leopoldstraat 95-E, Mechelen (Belg.).

Libertempo.

Kiu havas aŭ scias por geedzoj kun 2 infanetoj (2½ kaj 8 jaraj) lokon, por laboristo pagebla, por pasiĝi 14 tagan libertempon? Skribu tuj al k-do B. C. Rasenberg, Quintstraat 7 d, Rotterdam (Zuid).

Deziras korespondi:

Junaj gimnazianoj kun junularo el ĉiuj landoj. Adr.: Gimnazio de Z. Petkowska, Lodz, ul. Wolczanska 55, Polio.
Anoj de la Sutton Esp. Klubo, 3 Hillcroome Road, Sutton, Surrey, Anglio.
14 entuziasmuloj: skribu al Frank Netrval, 16 Leamington Road, Blackburn, Anglio.

Letervespero aranĝas:

Je 15 Sept. '46 la centro „Stelo", adr. Dro. J. Miguel Reyes, Tartagal (Salta), Argentinië.

Gekdoj el Holando!

Bonvolu sendi salutkartojn (bilde) al grupo de 24 gejunuloj, por pruvi ke Esperanto vivas en la mondo.
Adreso: Raimund Leber, Wiener Neŭstadt, Pottendorfstr. 121/14, Aŭstrio.

Alvoko.

Petu de Budapesta Turisma Oficejo, Budapast V, Deák Ferencu U, kajeron pri ruinigita Budapest, en Esperanto (ĝis nun aperis angle, france kaj germane).

Foto Sat-kongreso.

K-do R. Rigter, Goudsbloemstraat 4, Zwolle ricevis de anglino Rose Waters foton de ŝi kun 4 kdoj (instruistoj?) ĉe fontano, farita dum la SAT-kongreso en Kopenhago. La adreson de la 4 personoj ne plu posedas nomita K-dino. Tial ne eblis sendi la foton.